

Ludwig Uhland,

La kapelo

tradukita de Manfred Retzlaff

Supre staras la kapelo
 Sur la pinto de la mont',
 La paŝtist' en suna helo
 Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
 De funebro sonas de
 La altaĵ' tra la kvieto,
 La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
 La gajuloj post viv-fin'.
 Ho, paŝtisto, iam oni
 Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland.

Ludwig Uhland,

La kapelo

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Supre tronas sur la monto
 La kapelo en kviet'.
 En la valherbej' ĉe l' fonto
 Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
 Ektimigas mortkantad'.
 Finas tuj la ĝojjubilo
 De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
 Supren en la tombojn venos
 Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
 jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.